93ª Universala Kongreso de Esperanto

Roterdamo, 19-26 julio 2008

DUA BULTENO

Kongresa temo

Lingvoj: trezoro de la homaro

Enhavo

Loka Kongresa Komitato ..... interna frontkovrilo
Kongresa temo 2
Por eniri la landon 3
Kiel atingi la kongresejon 4
Utilaj informoj pri Nederlando kaj Roterdamo 5
Loĝado en Roterdamo 6
  Hoteloj kaj aliaj loĝebloj 7
Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj 11
  Antaŭkongresaj ekskursoj 11
  Postkongresaj ekskursoj 15
Dumkongresaj ekskursoj 20
  Tuttagaj ekskursoj 21
  Duontagaj ekskursoj 23
  Semajna skemo de ekskursoj 26
Bankedo 27
Provizora programo 28
Programeroj dum UK 29
Kiu kongresas kiam kaj kie? 30
Ĝeneralaj informoj 30
Kontaktinformoj 32
Kongresaj perantoj ..... interna dorskovrilo

Kovrilo: Francisco L. Veuthey

Loka Kongresa Komitato

Prezidanto – Ans Bakker
Sekretario – Ineke Emmelkamp
Ekskursoj – Loes Demmendaal
Eksteraj rilatoj – Joke Hoobroeckx
Kongresejo, helpantoj – Marijke Lathouwers
Ekstera informado – Bert de Wit
KKS – Clay Magalhães

93-a Universala Kongreso de Esperanto

DUA BULTENO

Roterdamo

19-26 julio 2008

Kongresa temo

UN proklamis la jaron 2008 Internacia Jaro de Lingvoj, rekonante, ke "vera plurlingvismo antaŭenigas unuecon en diverseco kaj internacia interkompreno". Koïchiro Matsuura, ĝenerala direktoro de Unesko, siavice parolis pri la "decida graveco" de lingvoj por "la multaj defioj, kiujn la homaro devos alfronti dum la venontaj jardekoj". Li vidas strategian rolon por lingvoj en la antaŭeniro al "daŭropova evoluigo kaj harmonia rilato inter la tutmonda kaj la loka". La identeco-donan funkcion de lingvoj li nomas nepra por la paca kunekzisto de individuoj kaj homgrupoj.

Ĉio ĉi eĥas la valorojn de la E-komunumo, kiujn oni trovas ekz. en la Praga Manifesto, i.a. la celojn de lingva demokratio, efika multlingva edukado, savtenado de lingva diverseco, kaj la pli ambicia celo de homa emancipiĝo. Tiel, la temo de nia UK, "Lingvoj: trezoro de la homaro", akordiĝas kun la Jaro de Lingvoj.

Laŭ Matsuura, "en la daŭro de kelkaj generacioj, pli ol 50% el la 7 000 lingvoj de la mondo povos malaperi. Nun malpli ol kvarono el ili estas uzata en lernejoj kaj interreto, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj forestas el la eduksistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj ĝenerale el la publika sfero." Li emfazas la bezonon de lingvopolitiko kiu ebligu "la uzon de [la] gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la rego de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu internacia lingvo." Multaj el ni konsentas kun li, ke alfrontas la homaron katastrofa kultura malriĉiĝo. Sekve ni invitas vin pripensi tiun ĉi temon, i.a.:

- En kiu senco eblas nomi lingvojn trezoro?
- Kiom ampleksas kaj diversecas tiu trezoro?
- Kion faras la homaro por dokumenti ĝin?
- Kion faras la homaro por savteni la endanĝerigitajn lingvojn?
- Ĉu valoras konservi tiun trezoron? Ĉu tio tro kostas? Kiom kostas ne konservi ĝin?
- Kion povas fari la E-komunumo?
- En multlingva mondo, kiel administri la ofte konfliktajn postulojn de memdecido, naciiĝado, ekonomiaj bezonoj kaj paca kunekzistado?
- Tra la historio, kiel la homaro faris pontojn trans lingvojn kaj kulturojn?
- Kiuj el niaj iniciatoj kontribuas al la supraj demandoj?
- Kiajn avantaĝojn proponas Esperanto kiel solvo al la lingva defio?

Kiel komunumo, kiu dum pli ol jarcento estas ekzemplo de efika interkultura komunikado, ni bonvenigas la atenton de la internacia komunumo al lingvaj defioj. Kaj dum la lingvojaro kaj okaze de la centjariĝo de UEA, ni disponigu niajn komprenojn al la monda komunumo.

A. Giridhar Rao
agiridhar.rao@gmail.com

Por eniri la landon

Ĝenerale. Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj, kaj ke ili konstante ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima kongreslanda diplomatia reprezentejo (bv. mem trovi ties adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi devas havi vizon, kaj sub kiuj kondiĉoj. UEA kaj LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2008, kaj principe ne povos respondi al tiaj malfruaj petoj.

Vizoj. La civitanoj de EU, kaj interalie de la jenaj landoj, ne bezonas vizon por eniri Nederlandon: Argentino, Aŭstralio, Brazilo, Ĉilio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Kostariko, Meksiko, Nov-Zelando, Svislando, Urugvajo, Usono kaj Venezuelo. Konsilindas tamen kontakti la plej apudan nederlandan ambasadejon por kontroli ĉu okazis ŝanĝoj intertempe.

Por peti la nederlandan (*Schengen-*) vizon necesas prezenti financajn garantiojn kaj ateston pri asekuro por la periodo dum kiu oni estos en Nederlando.

Ĉiu kongresano devas mem zorgi pri la akiro de vizo. En escepte komplikaj kazoj oni povas peti helpon de UEA.

Datoj. Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresa daŭro (19-26 julio, eventuale plus la daŭro de menditaj antaŭkaj/aŭ postkongresaj ekskursoj). Eventualan pli longan restadon oni devas aranĝi private.

Konfirmiloj kaj invitleteroj. Normale la kongresa konfirmilo devus sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun UEA/LKK sendos se oni petas ĝin, al aliĝintaj kongresanoj el vizbezonaj landoj. Al nealinĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmaĵojn. Bv. konscii, ke nek UEA nek LKK povas infui la decidojn de la vizdonaj instancoj.

Mongarantio. Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon, necesas pruvi ĉe la eniro en la landon ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj monrimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al iu ajn kongresano. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando.

Asekuro. Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de asekuro, pri kio la kongresanoj zorgu mem. Ofte tute taŭga asekuro estas aĉetebla ĉe flughavenoj. Sendepende de tio, ĉu necesas havi vizon aŭ ne, ĉiu kongresano tamen asekuru sin por la daŭro de la vojaĝo kaj restado.

Kiel atingi la kongresejon

La kongresejo estas Beurs-WTC. Ĝi troviĝas en Beursplein (Borsa placo) ĉe la ĉefa strato de Roterdamo, Coolsingel.

De la Amsterdama internacia flughaveno Schiphol bv. preni *Intercity*-trajnon (direkto Vlissingen aŭ Dordrecht) aŭ la internacian trajnon al Bruselo (tamen ne la trajnon *Thalys*, por kiu necesas anticipa lokrezervo!) ĝis la Roterdama Centra Stacio (Rotterdam CS).

De la Roterdama flughaveno bv. preni aŭtobuson n-ro 33. Ĝia finhaltejo estas la Roterdama Centra Stacio.

De la Roterdama Centra Stacio eblas iri piede (15-20 min., vidu sube), taksie, metroe aŭ trame (haltejo Beurs) al la kongresejo. Biletoj (= kartoj) por la publikaj transportoj aĉeteblas ĉe poŝtoficejoj, kelkaj tabakejoj, el maŝinoj (aŭtomatoj) ĉe la metrostacioj, kaj ĉe la transportiloj mem.

Utilaj informoj pri Nederlando kaj Roterdamo

Situo: Nederlando situas nordokcidente en Eŭropo. La ĉefurbo estas Amsterdamo (ankaŭ la plej loĝata urbo), sed la registaro rezidas en Hago. Roterdamo estas la dua plej granda kaj la plej avangarda urbo en Nederlando.

Loĝantaro: Nederlando havas ĉ. 16 500 000 loĝantojn kaj Roterdamo ĉ. 600 000, el kiuj 45% havas alilandan devenon. Nederlando estas unu el la plej dense loĝataj landoj en la mondo, kun po 395 loĝantoj en kvadrata kilometro.

Klimato: Mildaj someroj kun kelkaj tre varmaj tagoj.

Lingvoj: La nederlanda kaj frisa estas la oficialaj lingvoj. Tre parolata estas ankaŭ la angla, iom malpli la germana kaj la franca. Populariĝas la hispana. En Roterdamo oni aŭdas ofte ankaŭ la portugalan pro la granda kaboverda komunumo, la araban (ĉefe pro marokanoj), kaj ankaŭ la turkan.

Mono: La oficiala mono estas la eŭro, dividita en 100 cendoj. Moneroj: 1, 2, 5, 10, 20, 50 cendoj, 1 kaj 2 eŭroj. Monbiletoj: 5, 10, 20, 50, 100, 200, 500 eŭroj. Kreditkartoj ne estas tre popularaj, sed en hoteloj kaj kelkaj restoracioj akceptataj. Pli popularaj estas eŭropaj debetkartoj (ekz. Maestro). Monŝanĝado eblas en flughavenoj, stacidomoj, bankoj kaj poŝtoficejoj.

Loka tempo: UTC +1 horo (+2 horoj somere).

Trinkakvo: Kranakvo estas bonkvalita, sed la homoj ofte preferas aĉeti mineralan akvon (*spa blauw* = sengasa, *spa rood* = kun gaso).

Laborhoroj: Vendejoj kutime laboras de la 9-a ĝis la 18-a de lundo al ĵaŭdo kaj sabate, de la 9-a ĝis la 22-a vendrede, kaj (nur apud la kongresejo!) de la 13-a ĝis la 17-a dimanĉe.

Elektro: La elektra tensio estas 220-volta. La kontaktiloj estas dupolusaj.

Transporto: Oni moviĝas tra Roterdamo plej facile, rapide kaj malmultekoste per publika transporto. Por uzi la tramojn, busojn kaj metroon oni devas unue aĉeti *strippenkaart* aŭ *OV-chipkaart* (karto kun kreditoj kiuj aŭtomate depreniĝas kiam oni eliras el la transportilo/stacio – bv. ĉiam legigi vian karton en la indikitaj lokoj kiam vi eniras *kaj* eliras el la transportilo). La *strippenkaart*, papera karto kun 15 aŭ 45 strioj, devas esti stampita tuj kiam vi eniras en la transportilon (ĉiu strio egalas al unu zono/areo en la urbo – plus unu strio por la startprezo). Por moviĝi en la urbocentro vi devas stampi la duan liberan strion. Eblas ke pli ol unu persono uzu la saman *strippenkaart* se iu kun karto stampas ankaŭ por ĉiu el la aliaj kunvojaĝantoj.

Medikamentoj: Se vi uzas preskribitan medikamenton, bv. kunporti kuracistan recepton en la latina. Apotekoj funkcias dum la normalaj laborhoroj (vd. supre). Nokta apoteko, de la 22-a ĝis la 8-a horo matene, troviĝas en Schiedamsedijk 80a (daŭrigo de Coolsingel sude).

Sanservoj: Eksterlandanoj havu konfirmilon pri sanasekuro. UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

Telefonado: Prefikso por telefoni de eksterlando al Nederlando estas +31; oni ellasu la unuan nulon de la regiona antaŭnumero. Por telefoni de Nederlando al eksterlando: 00 + landokodo + telefonnumero.

Loĝado en Roterdamo

Ĝeneralaj kondiĉoj de mendoj: La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj dorsflanke de la mendilo kaj plurloke en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Estas konsilinde legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

Loĝdatoj: Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la forlaso de la hotelo (foriro; do, la daton de la lasta mateno en la hotelo).

Eniro kaj eliro: Principe, eblas okupi ĉambrojn post la tagmezo de la mendita dato, kaj necesas forlasi la ĉambrojn ĝis la tagmezo de la lasta tago. Se vi ne okupas ĉambron dum la unua mendita tago, oni nuligas la rezervon, kaj vi perdas la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo!

Dulitaj ĉambroj kaj hazarda kunloĝigo: La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio dulitajn ĉambrojn oni disponigas *nur* al duopoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi al homoj kiuj nepre volas loĝi en dulitaj (aŭ plurlitaj) ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, ĉe la retpaĝo de la kongreso (🌐http://www.uea.org/kongresoj/uk_2008.html) troveblas anonctabulo por tiu celo.

Frueco de la mendo kaj alternativaj mendoj: Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongresoj okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue, kaj ne eblas garantii la plenumon de la originala mendo ĉiam laŭ la preciza deziro de la mendanto. Tial ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn. El la retpaĝo de la kongreso eblas scii, kiuj hoteloj jam estas plenaj.

Pagoj: La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

Ofertataj servoj: La ĉambroj de la menciitaj hoteloj (ne de la gastejoj/studentejoj/amasloĝejo) havas telefonon, televidilon, duŝejon (kelkaj ankaŭ bankuvon) kaj necesejon.

Limdatoj: La limdato por fari mendojn estas la 1-a de majo 2008. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte, ĝis la 1-a de junio, kaj nepre kontraŭ aparta krompago (40 eŭroj). Pri malmendaj reguloj konsultu la dorsflankon de la mendilo.

Loĝkonfirmo: Minimume unu monaton antaŭ la UK vi ricevos konfirmon pri via loĝado, kun detalaj informoj pri via hotelo kaj aliaj kongresaj gravaĵoj.

La prezoj estas en eŭroj (EUR) por unu persono por unu nokto.

Hoteloj kaj aliaj loĝebloj

La hoteloferto en Roterdamo estas tre varia kaj por ĉiaj buĝetoj. Tamen, ĝi ne estas senlima! Ĉefe la plej malmultekostaj loĝejoj havas malmulte da lokoj, ĉar temas pri malgrandaj konstruaĵoj.

Krom per la papera mendilo sendita kun la papera Dua Bulteno, ankaŭ eblas mendi per la retpaĝo de la kongreso: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2008.html.

Post kiam vi mendas, vi havas unu semajnon da tempo por ke la pago de la loĝejo estu plenumita. Post tiu tempo, se la pago ne atingas la Centran Oficejon de UEA aŭ la landan peranton, la mendo estos nuligita.

Kelkaj hoteloj havas ĉambrojn por nefumantoj, sed pro la hotelkapacito ne ĉiuj ĉambroj menditaj de UEA en tiuj hoteloj estas senfumaj.

La prezo de la ĉambro inkluzivas matenmanĝon, krom se alie indikite.

1. NH Atlanta Rotterdam, Coolsingel/Aert van Nesstraat 4. Kvarstela hotelo trans la strato antaŭ la kongresejo. Ampleksaj ĉambroj, klimatizilo, fridujeto, sekurŝranko, duŝejo kun bankuvo, japana restoracio. Matenmanĝo ne estas inkluzivigita. *Loko en ĉambro: unupersona 149 EUR, dulita 75 EUR.*

2. Bilderberg Parkhotel Rotterdam, Westersingel 70. Kvarstela hotelo, unu el la plej luksaj de Roterdamo. Modernaj ĉambroj kun bela rigardo super la urbo. Centre lokita antaŭ kanalo kaj metrostacio, ĉ. 700 m (aŭ je unu metrostacio) de la kongresejo. Privata ĝardeno, gimnastikejo, sendrata retkonekto kaj propra parkejo. *Loko en ĉambro: unupersona 200 EUR, dulita 108 EUR.*

3. Hilton Hotel Rotterdam, Weena 10. Kvarstela hotelo je 400 m de la kongresejo. Klimatizitaj ĉambroj, sendrata retkonekto, kafo/teo-maŝino kaj satelita/kabla televidilo, laborcentro, gimnastikejo kaj restoracio. *Loko en ĉambro: unupersona 121 EUR, dulita 66 EUR, trilita 54 EUR.*

4. Eden Savoy Hotel Rotterdam, Hoogstraat 81. Kvarstela hotelo je 500 m de la kongresejo. Klimatizitaj ĉambroj kun retkonekto, kafo/teo-maŝino, fridujeto, ankaŭ senpaga gimnastikejo, sendrata retkonekto en publikaj areoj, restoracio kaj kafejo. Parkejo antaŭ la hotelo kun rabato por hotelgastoj. Matenmanĝo ne estas inkluzivigita. *Loko en ĉambro: unupersona 121 EUR, dulita 61 EUR, trilita 54 EUR.*

5. Grand Hotel Philadelphia, Van Vollenhovenstraat 48-50. Kvarstela hotelo je 1,3 km de la kongresejo, kun tramhaltejo apude. La konstruaĵo el la 18-a jarcento estis originale ŝipoficejo. Krom komfortaĵoj de luksa hotelo (bankuvo, aparta duŝejo, sendrata retkonekto en la ĉambro), tiu ĉi hotelo elstaras pro sia sociala funkcio: laboras tie gejunuloj kun psika aŭ/kaj fizika handikapo por esti preparitaj por la labormerkato. *Loko en ĉambro: unupersona 120 EUR, dulita 60 EUR.*

6. Bastion Hotel Rotterdam Terbregseplein, Hoofdweg 40. Kvarstela hotelo je 3 km de la kongresejo, kun bushaltejo apude (busoj 34 kaj 37). Klimatizilo, gimnastikejo, parkejo k.a. *Loko en ĉambro: unupersona 102 EUR, dulita 64 EUR.*

7. Bastion Hotel Rotterdam/Rhoon, Driemanssteeweg 5 (fine de Groene Kruisweg). Tristela hotelo je 7 km de la kongresejo (aŭtobusoj 64 kaj 69) kun sendrata retkonekto, televidilo kaj parkejo. *Loko en ĉambro: unupersona 103 EUR, dulita 63 EUR.*

8. Bastion Hotel Brielle, Amer 1, Brielle. Tristela hotelo en apuda riĉhistoria urbeto Brielle. Taŭga por kongresanoj kun propra aŭtomobilo. Parkejo, sendrata retkonekto kaj komfortaj ĉambroj. *Loko en ĉambro: unupersona 100 EUR, dulita 62 EUR.*

9. Euro Hotel Centrum, Baan 14/20. Familia tristela hotelo urbocentre je 700 m de la kongresejo. Komfortaj ĉambroj kun i.a. televidilo kaj sendrata retkonekto. *Loko en ĉambro: unupersona 78 EUR, dulita 45 EUR, trilita 40 EUR.*

10. Hotel Breitner, Breitnerstraat 23. Tristela hotelo je 800 m de la kongresejo. Komfortaj ĉambroj kun sekurŝranko, ventumilo, telefono kaj modemkonekto, televidilo kaj senpaga sendrata retkonekto. *Loko en ĉambro: unupersona 88 EUR, dulita 55 EUR, trilita 50 EUR.*

11. Hotel van Walsum, Mathenesserlaan 199/201. Tristela hotelo apud la CO, jam 40 jarojn kromhejmo de UEA-estraranoj. Komfortaj ĉambroj kun la kutimaj iloj troveblaj en tiu kategorio. Sendrata retkonekto, restoracio kaj parkejo. *Loko en ĉambro: unupersona 79 EUR, dulita 52 EUR.*

12. Hotel Emma, Nieuwe Binnenweg 6. Tristela hotelo en la urbocentro, renovigita en 2006. Ĉambroj kun i.a. sekurŝranko, ventumilo, sendrata retkonekto, radio, televidilo, telefono, kafmaŝino kaj fridujeto. *Loko en ĉambro: unupersona 77 EUR, dulita 58 EUR, trilita 52 EUR, kvarlita 44 EUR.*

13. Hotel Turkuaz, Henegouwerplein 56-58. Komforta tristela hotelo je 1,7 km de la kongresejo. Kafo kaj teo 24-hore senpaga, sendrata retkonekto. *Prezo en ĉambro: unupersona 55 EUR, dulita 38 EUR, trilita 33 EUR.*

14. Hotel Campanile Oost, Koningslaan 2. Tristela hotelo je ĉ. 30 minutoj metroe de la kongresejo. Senpaga parkejo, sendrata retkonekto, restoracio, handikapul-amika. *Prezo en ĉambro: unupersona 71 EUR, dulita 44 EUR.*

15. Maritime Hotel Rotterdam, Willemskade 13. Tristela hotelo kun marista etoso en privilegia situo: ĉe la rivero Mozo (Maas), tuj apud la Erasmus-ponto, je ĉ. 900 m de la kongresejo, kun komfortaj ĉambroj. Sekurŝranko, senpaga Interreto por gastoj, etosplena kafejo kaj porpaga parkejo apud la hotelo. *Loko en ĉambro: unupersona 71 EUR, dulita 41 EUR.*

16. Hotel Floris, Graaf Florisstraat 68. Hejmeca hotelo je ĉ. 1,5 km de la kongresejo, en kvieta kvartalo apud la Centra Stacio. Komfortaj ĉambroj, kafejo kaj granda ĝardeno. En la unulitaj ĉambroj *ne* estas necesejo aŭ duŝejo! La du- kaj trilitaj ĉambroj havas duŝejon kaj necesejon. *Prezo en ĉambro: unupersona 45 EUR, dulita 45 EUR, trilita 45 EUR.*

17. Astoria Hotel, Pleinweg 203-205. Dustela hotelo kun hejma etoso trans la rivero Mozo en la sudo de Roterdamo. Atingebla pere de metroo (haltejo Zuidplein) plus tramo 2, haltejo je 2 min. de la hotelo. La hotelo havas kafejon, lavejon, lunĉpakaĵojn. Duŝejo en la koridoro. *Prezo en ĉambro: unupersona 35 EUR, dulita 35 EUR, trilita 35 EUR.*

18. Gastejo De Hoogkamer, Van Baerlestraat 252, NL-3132 EK Vlaardingen. Trankvila domo ĉe naturo en najbara urbo Vlaardingen kun ĉefe trilitaj ĉambroj (kelkaj du- kaj kvarlitaj). Por atingi la gastejon prenu trajnon el la centra stacidomo en Roterdamo direkte al Hoek van Holland, eliru ĉe la stacio Vlaardingen West kaj promenu 800 metrojn ĝis la gastejo (aŭ prenu aŭtobuson 56 elirante ĉe haltejo Erasmusplein Vlaardingen). Eblas kuiri en la gastejo. Butikoj kaj manĝvendejoj troviĝas apude. Bv. kunporti viŝ- kaj litotukojn. La gastejo fermiĝas inter la 23-a kaj 7-a horoj. Matenmanĝo ne inkluzivigita. *Prezo por persono: 20 EUR.*

19. Amasloĝejo Mafkees, Schaatsbaan 41-45. Simpla dormejo urbocentre, tuj apud la Centra Stacio. Du grandaj dormoĉambroj (unu miksita, alia nur por virinoj), duŝejoj, kaj viraj kaj virinaj necesejoj. Kafejo. Striktaj reguloj pri bruado kaj konduto. Fermita de la 11-a ĝis la 17-a horo ĉiutage. Matenmanĝo inkluzivigita. Bv. kunporti litotukojn aŭ dormosakon. *Prezo por persono: 11 EUR.*

Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

Nederlando estas malgranda lando kun amaso da vidindaĵoj. Ĉiu regiono havas sian apartan econ. Dum la kongresaj ekskursoj eblos ekkoni tiujn mirindajn lokojn, kiuj igas Nederlandon tiel ĉarma lando.

La antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj inkluzivas:
– restadon en kvalitaj hoteloj (3-stelaj);
– matenmanĝojn kaj vespermanĝojn en la hoteloj;
– lunĉoskatolojn de la hoteloj;
– transporton dum la ekskurso en altkvalitaj klimatizitaj aŭtobusoj;
– enirbiletojn por la vizitotaj lokoj;
– Esperantajn ĉiĉeronojn.

La ekskursoj *ne* inkluzivas:
– ekstrajn elspezojn en la hoteloj, ekz. telefonvokojn;
– trinkaĵojn;
– transporton de/al la flughavenoj;
– san-/vojaĝasekuron.

Ĉiuj ekskursoj devas havi minimume 30 partoprenantojn. Se estos malpli ol 30 partoprenantoj en iuj ekskursoj, tiam la prezoj altiĝos *aŭ la koncernaj ekskursoj estos nuligitaj*. En tiaj okazoj la partoprenantoj estos ĝustatempe informitaj pri tio kaj povos ŝanĝi al alia aŭ entute nuligi la ekskurson.

Ĉiuj ekskursoj povas havi maksimume 35 partoprenantojn. Bv. frue mendi por esti certa pri loko en tiu kiun vi deziras!

Antaŭkongresaj ekskursoj

A1 Nordo de Nederlando – Frislando kaj insulo Texel

14-a – 18-a de julio, 5 tagoj/4 noktoj

14.07 La ekskurso komenciĝos ĉe la flughaveno Schiphol (ĉefa halo, rekontiĝloko) je la 10h30 matene. Ekveturo al la naturriĉa Frislando, provinco norde en Nederlando, konata por sia pejzaĝo plena je lagoj. Dum la busveturado ni haltos en la nacia parko *De Weerribben* por lunĉi. En la nacia parko eblos mallonge boat-ekskursi. La ekskurso daŭros al la hotelo Holland Inn en Wolvega (adreso: Steenwijkerweg 52, NL-8471 LC Wolvega; ☎0561 61 8847), kie ni alvenos fine de la posttagmezo. Tempo por malstreĉiĝi. Vespermanĝo.

15.07 Matenmanĝo kaj ekveturo al la fama Jopie Huisman-muzeo en la urbo Workum. Tiu ĉi estis propra muzeo de la artisto/pentristo kaj feraĵisto. Sekve ni iros al la urbo Sneek, kie ni navigos sur lago kun la sama nomo. Reveno al la hotelo. Vespermanĝo.

16.07 Post la matenmanĝo ni ekveturos al la insulo Texel, trairante la gigantan digon *Afsluitdijk*. Pramŝipo alportos nin al la plej granda Wadden-insulo de Nederlando, insulo kun aparta kaj abunda naturo. Ni konatiĝos kun la insulo aŭtobuse, tamen kun sufiĉe da tempo por bone aprezi la tuton. La tagmanĝo estos servita en lunĉoskatolo. En la fino de la posttagmezo ni reiros al la hotelo. Vespermanĝo.

17.07 Matenmanĝo kaj ekveturo laŭ Stavoren, konata pro la "Virineto de Stavoren", al Hindeloopen, konata pro siaj bunte kolorigitaj lignaĵoj. Vizito al la Frisa Sketmuzeo. Posttagmeze ni iros tra Workum al Sonnema Beerenburg-muzeo en Bolsward. Post belega diapozitiva prezento ni ricevos kafon aŭ regionan alkoholaĵon. Fine de la posttagmezo reveno al la hotelo tra la historia IJlst, laŭ la vojo de la malnovaj lignotranĉaj muelejoj.

18.07 Post la matenmanĝo ni vizitos la etosplenan havenurbon Harlingen. Lunĉo en la hotelo kaj ekvojaĝo al la Orkideejo en Luttelgeest. Tie ĉi oni vidos pluv-arbaron, orientan ĝardenon, orkidebredejon ktp. Adiaŭa vespermanĝo, transporto al la kongresejo kaj fino de la servoj.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 450 EUR, dulita 389 EUR.

Ekstra nokto de la 13-a ĝis la 14-a de julio en Hotel Ibis Amsterdam Centre, Amsterdamo (Stationsplein 49, ĉe la centra stacidomo). Loko en ĉambro, sen matenmanĝo: unupersona 115 EUR, dulita 70 EUR.

A2 Sudo de Nederlando – Zelando kaj Belgio

14-a – 18-a de julio, 5 tagoj/4 noktoj

14.07 La ekskurso komenciĝos ĉe la flughaveno Schiphol (ĉefa halo, rekontiĝloko) je la 10h30 matene. Ekveturo tra Brabanto al la unika Zelando, provinco kun diversaj vilaĝoj kun iliaj propraj kutimoj, dialektoj kaj pejzaĝoj. Halto en Ulvenhout por lunĉo kaj daŭrigo al Middelburg, belega urbo kun diversaj vidindaĵoj. La glaciaĵoj estas aparte bongustaj en Middelburg. Post konatiĝo kun la urbo, veturo al la hotelo Holland Inn Wemeldinge (adreso: Noordelijke Achterweg 62, NL-4424 EG Wemeldinge; ☎0113 62 1551), kie du ventomuelejoj, *Aeolus* kaj *Hoop*, beligas la vidaĵon. Vespermanĝo.

15.07 Post matenmanĝo vizito al la Zelanda Muzeo en Vlissingen, kie vi konatiĝos kun la riĉa zelanda marhistorio. Tagmanĝo el lunĉoskatolo. Posttagmeze ni vizitos *Portaal van Vlaanderen* (Pordego al Flandrio) en Terneuzen, kie ni konatiĝos kun la funkciado de la plej uzataj kluzoj en la mondo. Reveno al la hotelo. Vespermanĝo.

16.07 Post la matenmanĝo ni iros al la plej granda allogaĵo de Zelando: Waterland Neeltje Jans. La parko havas belegan fok-spektaklon, kompletajn klarigojn pri la *Deltawerken* (sudnederlanda dig-sistemo, konstruita por eviti similajn inundojn kiel tiu de 1953), kaj promenadon ene de la barilego kontraŭ marinundoj (*stormvloedkering*). Posttagmeze ŝipveturo el Neeltje Jans. Reveno al la hotelo. Vespermanĝo.

17.07 Matenmanĝo kaj veturo al la limregiono inter Nederlando kaj Belgio. Halto en la fascina Bruĝo, kie vi povos laŭ bontrovo konatiĝi kun la urbo. Posttagmeze ni iros al la naturrezervejo Zwin. La loko estas konata pro la bela naturo, diversspecaj birdoj, kaj amaso da promenvojetoj, taŭgaj ankaŭ por rulseĝuloj. Reveno al la hotelo. Vespermanĝo.

18.07 Matenmanĝo kaj ekveturo al la plej granda papiliejo de Eŭropo: *De Berkenhof* apud la urbo Goes. Lunĉo kaj veturo al Breda, ĉarmega urbo bone konata en Nederlando. Vespermanĝo, transporto al la kongresejo kaj fino de la servoj.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 440 EUR, dulita 389 EUR.

Ekstra nokto de la 13-a ĝis la 14-a de julio en Hotel Ibis Amsterdam Centre, Amsterdamo (Stationsplein 49, ĉe la centra stacidomo). Loko en ĉambro, sen matenmanĝo: unupersona 115 EUR, dulita 70 EUR.

Postkongresaj ekskursoj

P1 Nordo de Nederlando – Frislando kaj insulo Texel

27-a – 31-a de julio, 5 tagoj/4 noktoj

27.07 Renkontiĝo je la 8-a horo matene antaŭ la kongresejo kaj ekveturo al la naturriĉa Frislando, provinco norde en Nederlando, konata por sia pejzaĝo plena je lagoj. Dum la busveturo ni haltos en la nacia parko *De Weerribben* por lunĉi. En la nacia parko eblos mallonge boat-ekskursi. La ekskurso daŭros al la hotelo Holland Inn en Wolvega (adreso: Steenwijkerweg 52, NL-8471 LC Wolvega; ☎0561 61 8847), kie ni alvenos en la fino de la posttagmezo. Tempo por malstreĉiĝi. Vespermanĝo.

28.07 Matenmanĝo kaj ekveturo al la fama Jopie Huisman-muzeo en la urbo Workum. Tiu ĉi estis propra muzeo de la artisto/pentristo kaj feraĵisto. Sekve ni iros al la urbo Sneek, kie ni navigos sur lago kun la sama nomo. Reveno al la hotelo. Vespermanĝo.

29.07 Post la matenmanĝo ni ekveturos al la insulo Texel, trairante la gigantan digon *Afsluitdijk*. Pramŝipo alportos nin al la plej granda Wadden-insulo de Nederlando, insulo kun aparta kaj abunda naturo. Ni konatiĝos kun la insulo aŭtobuse, tamen kun sufiĉe da tempo por bone aprezi la tuton. La tagmanĝo estos servita en lunĉoskatolo. En la fino de la posttagmezo ni reiros al la hotelo. Vespermanĝo.

30.07 Matenmanĝo kaj ekveturo laŭ Stavoren, konata pro la "Virineto de Stavoren", al Hindeloopen, konata pro siaj bunte kolorigitaj lignaĵoj. Vizito al la konata Frisa Sketmuzeo. Posttagmeze ni iras tra Workum al Sonnema Beerenburg-muzeo en Bolsward. Post belega diapozitiva prezento vi ricevos kafon aŭ regionan alkoholaĵon. Fine de la posttagmezo ni revenos al la hotelo tra la historia IJlst, laŭ la vojo de la malnovaj lignotranĉaj ventomuelejoj.

31.07 Post la matenmanĝo ni vizitos la etosplenan havenurbon Harlingen. Lunĉo en la hotelo kaj ekvojaĝo al la Orkidejejo en Luttelgeest. Tie ĉi vi vidos pluv-arbaron, orientan ĝardenon, orkidebredejon ktp. Adiaŭa vespermanĝo, transporto al la kongresejo kaj fino de la servoj.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 450 EUR, dulita 389 EUR.

Ekstraj noktoj en Euro Hotel Centrum, Roterdamo. Loko en: unulita 78 EUR, dulita 45 EUR.

P2 Sudo de Nederlando – Zelando kaj Belgio

28-a de julio – 1-a de aŭgusto, 5 tagoj/4 noktoj

28.07 Renkontiĝo antaŭ la kongresejo je la 8-a horo matene kaj ekveturo tra Brabanto al la unika Zelando, provinco kun diversaj vilaĝoj kun iliaj propraj kutimoj, dialektoj kaj pejzaĝoj. Halto en Ulvenhout por lunĉo, kaj daŭrigo al Middelburg, belega urbo kun diversaj vidindaĵoj. La glaciaĵoj estas aparte bongustaj en Middelburg. Post konatiĝo kun la urbo, veturo al la hotelo Holland Inn Wemeldinge (adreso: Noordelijke Achterweg 62, NL-4424 EG Wemeldinge; ☎0113 62 1551), kie du ventomuelejoj, *Aeolus* kaj *Hoop*, beligas la vidaĵon. Vespermanĝo.

29.07 Post matenmanĝo vizito al la Zelanda Muzeo en Vlissingen, kie vi konatiĝos kun la riĉa zelanda marhistorio. Tagmanĝo el lunĉoskatolo. Posttagmeze ni vizitos *Portaal van Vlaanderen* (Pordego al Flandrio) en Terneuzen, kie ni konatiĝos kun la funkciado de la plej uzataj kluzoj en la mondo. Reveno al la hotelo. Vespermanĝo.

30.07 Post la matenmanĝo ni iros al la plej granda allogaĵo de Zelando:

Waterland Neeltje Jans. La parko havas belegan fok-spektaklon, kompletajn klarigojn pri la *Deltawerken* (sudnederlanda dig-sistemo, konstruita por eviti similajn inundojn kiel tiu de 1953), kaj promenadon ene de la barilego kontraŭ marinundoj (*stormvloedkering*). Posttagmeze ŝipveturo el Neeltje Jans. Reveno al la hotelo. Vespermanĝo.

31.07 Matenmanĝo kaj veturo al la limregiono inter Nederlando kaj Belgio. Halto en la fascina Bruĝo, kie vi povos laŭ bontrovo konatiĝi kun la urbo. Posttagmeze ni iros al la naturrezervejo Zwin. La loko estas konata pro la bela naturo, diversspecaj birdoj, kaj amaso da promenvojetoj, taŭgaj ankaŭ por rulseĝuloj. Reveno al la hotelo. Vespermanĝo.

1.08 Matenmanĝo kaj ekveturo al la plej granda papiliejo de Eŭropo: *De Berkenhof* en Goes. Lunĉo kaj veturo al Breda, ĉarmega urbo bone konata en Nederlando. Vespermanĝo, transporto al la kongresejo kaj fino de la servoj.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 440 EUR, dulita 389 EUR.

Ekstraj noktoj en Euro Hotel Centrum, Roterdamo. Loko en: unulita 78 EUR, dulita 45 EUR.

P3 Landa "krozo" ĉirkaŭ Maastricht

26-a de julio – 2-a de aŭgusto, 8 tagoj/7 noktoj

Ni uzu flekseblan difinon de "krozo" por nia ekskurso – ĉar ni kunvenos kaj dormos en ŝipo, malnova, sed vera ŝipo. Ĝi tamen estas ligita al la ĉefa promenejo de Maastricht kaj tute ne moviĝas. Ĝia nomo estas Botelo, sed ni renomos ĝin *Boat-elo* – ĉar ni konas la diferencon inter botelo kaj boato, cu ne? Fakte ĝi estas du barĝoj kunligitaj: la malpli granda servas kiel ferdeko por sidi, kunveni kaj ĝui la etoson. Interne la litoĉambroj estas kompaktaj (t.e., malgrandaj) sed puraj, kun propraj necesejoj kaj duŝoj. La malgrandaj rondaj fenestroj aldonas al la senton de krozo. Nia boato antaŭe krozadis en la rivero Meuse, aŭ *Maas* nederlande. Ĝi nun estas konvena por ni pro sia situo *en* la akvo *en* la mezo de la urbo.

Premita inter la belga kaj germana landlimoj, Maastricht estas unu el la plej belaj, ĉarmaj kaj vizitindaj urboj en Eŭropo. Kun longa historio ekde antaŭ la alveno de la romianoj, ĝi nun estas kosmopolita urbo kun gaja animeco nerivalata aliloke en Nederlando. Granda parto de la cetero de Nederlando havas samecan aspekton, sed tie ĉi estas hispanaj kaj romiaj ruinaĵoj, diversaj specoj de kuirartoj, franca/belga influo en la arkitekturo, kaj eĉ malsameca pejzaĝo. Maastricht estas malgranda kaj facile promenebla urbo, plejparte glata sed kun kelkaj proksimaj "tuberoj" kiujn ili nomas montetoj, kie fascinaj kavernoj entenas antikvan kaj modernan historion, inkluzive de ampleksaj tuneloj uzataj por ŝirmado tra la jarcentoj, kaj por savi artaĵojn de la lando kontraŭ la germana invado dum la Dua Mondmilito.

26.07 Alveno en Maastricht (du horojn per trajno el Roterdamo). Ni povas aranĝi grupan trajn-veturadon se vi ne havas alian manieron atingi la Boatelon. Necesos esti tie antaŭ la 15-a horo por enhoteliĝi kaj promeni al la urbodomo por aŭskulti koncerton de la tiea kariljono de la 15h30 ĝis la 16h15. Poste, kun mapo en mano, ni reiros al la Boatelo por prepari por la interkona vespero/vespermanĝo ĉe *Eetcafe Minchelers* ĉe la *Markt* (bazara placo).

27.07 De la 11-a ĝis la 17-a horo profesia ĉiĉerono montros al ni la plej belajn lokojn en la malnova urbocentro, inkluzive de katedraloj nun uzataj por aliaj celoj, kaj de la fama muzeo *Bonnefanten*. Ni tagmanĝos en la centro kaj lernos kien veni por aliaj manĝoj.

28.07 Tuttaga vizito al Suda Limburgo, kelkaj preĝejoj, kaj la Maastricht-a universitato. Vespermanĝo ĉe la restoracio *De l'Empereur*.

29.07 La supre menciitaj kavernoj kaj tuneloj, tagmanĝo ĉe la supro de la monto, kaj libera vespero por ripozo kaj kulinara frandado. Ĉi tiu tago inkluzivas multe da promenado kaj iom da grimpado.

30.07 Tuttaga krozo sur (alia) ŝipo al Liège, Belgio. Promeno en Liège kaj kuna vespemanĝo en Maastricht.

31.07 Kvinlanda vizito – Belgio, Francio, Germanio, Luksemburgo kaj Nederlando – en nur ok horoj. Nekredeble!

1.08 Programo laŭ grupa decido. Listoj da ideoj haveblos dum la UK. Adiaŭa vespermanĝo.

2.08 Ĝis revido post matenmanĝo.

Notu: Se vi veturas hejmen el la Amsterdama flughaveno, vi devas atingi ĝin almenaŭ du horojn antaŭ la horo de via flugo. La trajno iras rekte en la flughavenon, sed nepre planu tiel ke via alhejma flugo estu posttagmeze.

La ekskurso komenciĝos ĉe la Maastricht-a Botelo sabaton posttagmeze la 26-an de julio, kaj finiĝos tie matene la 2-an de aŭgusto. La prezo inkluzivas sep noktojn kaj matenmanĝojn en nia Boatelo kaj aŭ tagmanĝon aŭ vespermanĝon ĉiun tagon (ĉe specialaj, malsamaj restoracioj por sperti la diversajn kuirartojn de la urbo), Esperantan ĉiĉeronadon aŭ tradukadon, kaj enirojn ĉe ĉiuj planitaj vizitindaj lokoj. Nia speciala gastiganto estas Hans Adriaanse, nia Maastricht-a amiko.

Prezoj: Loko en dulita kajuto 898 EUR; por la sama ĉambro por unuopulo 1105 EUR. Por ĉambroj por paroj kiuj preferas duoblan liton, ni aranĝos restadon en proksima "lito kaj matenmanĝo"-ejo kontraŭ proksimume la sama prezo. Minimuma nombro da partoprenantoj dudek, kun maksimumo de tridek. Bonvolu noti ke se estos malpli ol dudek partoprenantoj, la prezo devos altiĝi ĝis eventuale cent eŭroj pli alte. Aliĝante vi akceptas ankaŭ tian eventualan plialtiĝon.

Dumkongresaj ekskursoj

Kiel mendi ekskursojn?
Bonvolu atente tralegi la priskribojn kaj elekti. Post la elekto, plenigu klare kaj atente (preslitere) la koncernan parton de la mendilo, kaj sendu ĝin samtempe kun via pago al Roterdamo. Se en via lando estas kongresa peranto, vian mendon/pagon vi povas sendi al ŝi aŭ li. Por malmendoj validas la kondiĉoj presitaj dorsflanke sur la mendilo. Bv. ĉiam sendi la mendilon kaj pagon al la sama adreso, t.e. instanco.

Ĝeneralaj kondiĉoj
Ĉar ĉiuj ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizanto rezervas al si la rajton eventuale nuligi iujn ekskursojn, pri kio ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, kun propono de eblaj alternativoj.

Ĉiuj ekskursoj startas de antaŭ la kongresejo. Klopodu veni dek kvin minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos esperantlingvaj interpretistoj. Ili ne estas profesiaj ĉiĉeronoj sed nur bonvolaj helpantoj. Bv. indulgi ilin per pacienco kaj samideana komprenemo. Ili faros sian plejeblon por bone servi al vi. Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (EUR).

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la menditaj kongresaj biletoj. Sur la biletoj estos bazaj informoj pri la ekskurso (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj sur la biletoj. Ne forgesu preni ŝirmilojn kontraŭ suno kaj varmo! Bv. noti ke la tereno en kelkaj ekskursoj povas esti netaŭga por homoj kun marŝhandikapoj. La priskriboj de la ekskursoj kutime mencias tion.

Servoj inkluzivigitaj
– ĉiĉeronado de loka turisma servo kaj esperantlingva ĉiĉerono;
– vojaĝo per altnivelaj aŭtobusoj (ne kiam temas pri piedira, skutila aŭ publiktransporta ekskurso!);
– enirbiletoj de la vizitataj lokoj (krom se alie indikite).

Ni rekomendas al la partoprenantoj de la dumkongresaj ekskursoj porti komfortajn ŝuojn, leĝerajn vestaĵojn, sunprotektan kremon kaj sunŝirmilon (ĉapon, sunumbrelon aŭ simile).

Tuttagaj ekskursoj

La tuttagaj ekskursoj okazos precipe en merkredo, la 23-a de julio, sed ankaŭ en aliaj tagoj. La prezoj inkluzivas kafon kun biskvitoj kaj foje malgrandan lunĉon, sed ne vere plenan tagmanĝon.

E1 Ĉirkaŭ IJsselmeer

Lundo kaj merkredo Ekiro: 8h00 Reveno: ĉ. 18h30 Prezo: 49 EUR

Tiu ĉi ne estas simpla tuttaga ekskurso: ĝi estas la plej malstreĉa, sed kun plej diversaj pejzaĝoj. Ĉirkaŭ la urbo Volendam ni trinkos kafon kun kuketo kaj sekve iros tra *Afsluitdijk* al la frisa kamparo. La ekskurso sekvos parte tra la Ald-Faers-Erf-vojo. Ni vizitos la *Woord & Beeld*-preĝejeton kaj ekspozicion tie, kaj aŭtentikajn bienojn. Eblos vidi diversajn flankojn de la kampara vivo tra la diversaj riparejoj, bakejoj, ĉasdometo ktp.

E2 Ĉirkaŭ Dordrecht kaj Kinderdijk

Mardo kaj merkredo Ekiro: 9h00 Reveno: ĉ. 17h00 Prezo: 50 EUR

Ekiro al Alblasserwaard. Kafo kaj kuketo estos servataj, kaj sekve ni vizitos tiun ĉi trankvilan areon, kun dormantaj vilaĝoj, historiaj bienoj kaj glaci-epokaj montetoj. *Kinderdijk*, aro de ventomuelejoj en la Unesko-listo de konservendaj lokoj, estas la plej fama "enloĝanto" de la urbo. Lunĉo en la cikonia vilaĝo Groot Ammers. Daŭrigo al Sliedrecht, kie ni ŝanĝos la aŭtobuson por… akvobuso! Ĉirkaŭ 40-minuta veturado laŭ la rivero Merwede tra la urbo Papendrecht al la plej malnova urbo de Nederlando, Dordrecht, kiu ricevis urborajtojn en 1220. Diversaj luksaj domoj memorigas nin pri la plej prospera periodo de la urbo, kun kiu vi havos kompletan konatiĝon.

E3 Reĝa Hago

Merkredo *Ekiro: 9h00* *Reveno: ĉ. 17h30* *Prezo: 50 EUR*

Hago estas la sidejo de la nederlanda registaro kaj de la reĝa familio. Ĝi ankaŭ estas kultura urbo kaj butikuma urbo. La ekskurso komenciĝos per kafo kaj kuketo, sekve promeno "tra la spuroj de Oranje-familio" kiu portos vin al palacoj, reĝaj staloj kaj diversaj aliaj lokoj kun rilato al la nederlanda reĝa familio. Tagmeza kafo en Haga restoracio. Tagmeze vizito al la Pacpalaco, sidejo de la Internacia Tribunalo.

E4 Vlissingen

Merkredo kaj vendredo *Ekiro: 10h30* *Reveno: ĉ. 18h30* *Prezo: 47 EUR*

Vlissingen, urbo de la nederlanda heroo Michiel de Ruijter, estas la sola urbo en Nederlando kun sia historia urbocentro ĉe la maro. La historio de Vlissingen estas plena je konkeradoj, pafadoj kaj inundoj. Je alveno, kafo kaj loka kuketo estos servataj al vi. Vizito al *Het Arsenaal*, vivanta muzeo kun akvario kaj parko de piratoj, kie vi konatiĝos kun la vivstilo de tiuj historiaj personoj. Vi travivos emocian aventuron en la ŝipa simulilo kaj vidos gigantajn varŝipojn trairi antaŭ viaj okuloj la akvovojon, rigardante el turo de la 17-a jarcento.

E5 Veluwe

Merkredo *Ekiro: 8h00* *Reveno: ĉ. 18h30* *Prezo: 48 EUR*

Alveno al la pulmo de Nederlando, la naturriĉa Veluwe. Kafo kaj kuketo ĉe restoracio *De Molen*. Promenado tra la parko gvidate de eksa forstisto, kiu montros siajn preferatajn lokojn kaj rakontos interesajn anekdotojn. Post la lunĉo spektado al malnov-nederlanda folklorgrupo (muziko, dancoj kaj kostumoj) aŭ libera tempo en la parko.

E6 Zaanse Schans, Volendam kaj Amsterdamaj kanaloj

Merkredo kaj ĵaŭdo Ekiro: 8h00 Reveno: ĉ. 19h00 Prezo: 51 EUR

Ekiro, paŭzo por kafo kaj kuketo, kaj alveno al Zaanse Schans, ĉarma kaj aparta vilaĝeto kie la ventomuelejoj ankoraŭ funkcias laŭ la originalaj celoj, kaj ankaŭ estas uzataj kiel loĝejoj. Daŭrigo al apuda Volendam, tipa fiŝista vilaĝo kun malnovaj pentraĵ-aspektaj dometoj. Paŭzo por kafo kaj daŭrigo al Amsterdamo, kie ni ŝip-ekskursos tra la internacie konataj Amsterdamaj kanaloj. Unika sperto, unika ekskurso!

Duontagaj ekskursoj

D1 Roterdamo kaj Eŭromasto

Sabato kaj dimanĉo Posttagmeze (13h30-18h30) Prezo: 21 EUR

Aŭtobusa ekskurso tra la nova kaj malnova Roterdamo, tra la konataj stratoj Weena kaj Coolsingel kaj aliaj malpli konataj, sed same interesaj. Kop van Zuid-duoninsulo kun ponto Erasmus certe estos parto de la vizito, same kiel aliaj turismaj allogaĵoj de la urbo. Finu la ekskurson en la turo Eŭromasto, de kie vi havos kompletan superrigardon de Roterdamo kaj de la apuda regiono.

D2 Silento en Biesbosch

Lundo *Posttagmeze (13h00-17h30)*
Ĵaŭdo *Matene (9h00-13h30)* *Prezo: 28 EUR*

Konatiĝu kun la nacia parko Biesbosch, ĝia unika naturo kaj protektitaj plantoj kaj bestoj pere de elektra ŝipo. Tiu silenta ŝipo havas la rajton iri al lokoj malpermesitaj al aliaj, ne elektraj, bruaj ŝipoj. Tiu ĉi nacia parko estis spontanee kreita de la naturo kaj ankaŭ de la homoj. Pro sia bunta naturo, dum la milito ĝi servis kiel rifuĝejo por tiuj kiuj havis kialon kaŝiĝi. Ĝuu kaj unuiĝu kun la naturo!

D3 Delfshaven, muelejo kaj bierfabriko

Dimanĉo, mardo kaj ĵaŭdo *Posttagmeze (14h00-16h00)* *Prezo: 34 EUR*

Delfshaven komence estis haveno de la pli norda urbo Delft, sed poste iĝis kvartalo de Roterdamo. Grandparte pro la detruo okazinta en la centro de Roterdamo dum la Dua Mondmilito, Delfshaven estas nuntempe la plej pitoreska loko de la urbo. Sur ĝia kanalo troviĝas la sola funkcianta muelejo en Roterdamo, kiu daŭre fabrikas kaj vendas farunon; la preĝejo de kie la Pilgrimantaj Patroj ekiris, tra Britio, por kolonii Usonon; kaj la sola bierfabriko de Roterdamo. Publika transporto.

D4 Historia tramo tra Roterdamo

Lundo kaj mardo *Matene (9h00-10h30)* *Prezo: 25 EUR*

Vizitu Roterdamon en historia tramo el 1931. La ekskurso portos vin al la plej ĉarmaj kvartaloj de la urbo, tra la ĉefaj turismaj allogaĵoj. La tramo en si mem jam estas aparta allogaĵo, kaj en ĝi vi spertos vojaĝon en la tempo.

D5 Skutilo tra Roterdamo

Lundo kaj vendredo *Matene (9h00-11h30)* *Prezo: 27 EUR*

Alia maniero konatiĝi kun la urbo Roterdamo estas pere de skutilo. Grupoj de minimume 8 personoj irados tra la plej interesaj lokoj de la urbo, ĉiu loko kun aparta rakonto. Vi ekzercos ne nur viajn okulojn kaj cerbon, sed ankaŭ viajn muskolojn.

D6 Kuir-teatro

Ĵaŭdo *Posttagmeze (14h00-17h30)* *Prezo: 65 EUR*

Aparta kaj ekskluziva aktivado. La kuir-teatro estas ejo kie grupo de maksimume 40 personoj kune kuiras kaj manĝas multkulturajn pladojn. Ĝi estas maniero senstreĉiĝi, konatiĝi pli bone kun viaj kunuloj, kaj lerni (pli bone) kuiri alilandajn pladojn. Inkluzivas ĉiujn ingrediencojn de la 5-plada maroka menuo. Trinkaĵoj aparte pageblaj. Unika ŝanco certe ne perdinda!

D7 Amfibia buso

Lundo kaj mardo *Posttagmeze (14h00-15h30)*
Ĵaŭdo *Matene (10h00-11h30)* *Prezo: 17 EUR*

Unika maniero konatiĝi kun Roterdamo, surtere kaj surakve. La ekskurso portos vin trans la Erasmus-ponton al Katendrecht, kie la aŭtobuso eniros la riveron Maas kaj ebligos al vi havi alian rigardon de la urbo, el la akvo. Revenante, la buso laŭiros la Nordan Insulon, Willems-ponton, Blankan Domon (unua ĉielskrapulo de Eŭropo), Kubformajn Domojn, kaj Laurens-preĝejon.

D8 *Spido*-havenekskurso

Vendredo *Posttagmeze (14h00-15h30)* *Prezo: 10 EUR*

Jen la plej bona maniero ekkoni la plej grandan havenon de Eŭropo, iam la plej grandan en la mondo. Dum tiu ĉi ekskurso vi konatiĝos kun la moderneco de la haveno kaj ricevos buntan informon klarigantan diversajn detalojn de la havenlaboro. Publika transporto ĝis la ŝipo.

D9 Hagaj muzeoj kaj Pacpalaco

Mardo *Matene (9h00-13h00)* *Prezo: 25 EUR*

Tiu ĉi interesa ekskurso donos al vi la eblecon elekti koni aŭ la muzeon Yi Chun (koreo, kiu venis alparoli la parto-prenantojn de la Dua Packonferenco en Hago en 1907, pledonte por pli da atento al la tiame subpremataj koreoj; tamen oni ne permesis tion al li, kaj kelkajn tagojn post sia alveno en Nederlando li subite kaj mistere mortis), aŭ la muzeon Panorama Mesdag (kie videblas la plej granda nederlanda pentraĵo kaj plej malnova panorama pentraĵo en la mondo, kiu restas en sia originala loko, pentrita de Hendrik Willem Mesdag – la muzeo provizos Esperantan klarigon el sia sonsistemo!). La daŭrigo de la ekskurso estos vizito al la Pacpalaco.

Semajna skemo de ekskursoj

T = tuttaga ekskurso; M = duontaga ekskurso matene; P = duontaga ekskurso posttagmeze

	Sab 19/07	Dim 20/07	Lun 21/07	Mar 22/07	Mer 23/07	Ĵaŭ 24/07	Ven 25/07	Prezo
E1 IJsselmeer			T		T			49 EUR
E2 Dordrecht/Kinderdijk				T	T			50 EUR
E3 Reĝa Hago					T			50 EUR
E4 Vlissingen					T		T	47 EUR
E5 Veluwe					T			48 EUR
E6 Zaanse Schans					T	T		51 EUR
D1 Eŭromasto	P	P						21 EUR
D2 Biesbosch			P			M		28 EUR
D3 Delfshaven		P		P		P		34 EUR
D4 Historia tramo			M	M				25 EUR
D5 Skutilo			M				M	27 EUR
D6 Kuir-teatro						P		65 EUR
D7 Amfibia buso			P	P		M		17 EUR
D8 *Spido*-havenekskurso							P	10 EUR
D9 Hagaj muzeoj				M				25 EUR

Bankedo

La bankedo okazos lundon, la 21-an de julio, je la 19h30, en la interetaĝa restoracio (inter la 1-a kaj 2-a etaĝoj).

Aperitivkukaĵo

Ravioloj el kuirita interripaĵo farĉitaj per figoj, prezentitaj sur manĝebla aperitivaĵkulero en balzama siropo

Vegetara*: Freŝa mango kun bazilio kaj freŝe raspita malnova Roterdama fromaĝo*

Antaŭplado

Karpaĉo el tinuso, prezentita kun ruĝa betosalato kaj freŝa saŭco (pano kaj herb-oleo)

Vegetara*: Leĝere amelita supo el akvokreso kun ravioloj el fungoj*

Ĉefplado

Duo el bovolumbaĵo kaj kokinfileo farĉita per ruĝa portersaŭco/morkelsaŭco

Sezonaj legomoj kaj terpoma garnaĵo

Vegetara*: Frititaj kanelonioj farĉitaj per kaprina fromaĝo kaj sunlandaj tomatoj*

Deserto

Granda deserto

Trinkaĵoj

Gastrinkaĵoj, vino, biero, kafo kaj teo

Prezo: 75 EUR

Provizora programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

Sabato, 19 julio. Malfermo de la kongresejo je la 09h00. Alveno de kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Loĝigo. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj (17h00). Artistoj. Libroservo. Movada Foiro/ Interkona Vespero (19h00). Giĉetoj funkcias ĝis la 18h00.

Dimanĉo, 20 julio. Solena Inaŭguro (10h00). Ekumena Diservo. Inaŭguro de IKU/AIS. Kongresa Temo. Paroligaj Kursoj. Nederlanda Eksprese. Libroservo. Nacia Vespero.

Lundo, 21 julio. Kleriga Lundo. ILEI. IKU-prelegoj. Cseh-Kurso kaj Cseh-Seminario. Paroligaj Kursoj. Nederlanda Eksprese. Ekzamenoj (registriĝo kaj antaŭtesto). UEA 100-jara. Libroservo. Bankedo. Balo.

Mardo, 22 julio. Tago de la lernejo. IKU-Prelegoj. Kongresa Temo. Cseh-Kurso kaj Cseh-Seminario. Paroligaj Kursoj. Nederlanda Eksprese. Ekzamenoj (skribaj). Estraro Respondas. Landa Agado. Delegita Reto. Libroservo. Societo Zamenhof. Teatro.

Merkredo, 23 julio. Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

Ĵaŭdo, 24 julio. Tago de la Libro. IKU-Prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Cseh-Kurso kaj Cseh-Seminario. Paroligaj Kursoj. Ekzamenoj (parolaj). CO Respondas. Urba Akcepto (por invititoj). Libroservo. Koncerto.

Vendredo, 25 julio. Komitato de UEA. IKU-Prelegoj. Paroligaj Kursoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Ĉefdelegitoj kaj Perantoj. Venontaj UK-oj. Libroservo. Internacia Arta Vespero.

Sabato, 26 julio. Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00).

Programeroj dum UK

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA. Dum la UK okazos la Internaciaj Ekzamenoj pri Esperanto je elementa kaj meza niveloj de ILEI/UEA. La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika testo, skriba parto kaj parola parto. Nur sukcesintoj en la gramatika testo rajtas partopreni la skriban parton de la ekzameno kaj, atinginte en tiu skriba parto la sukceslimon de 60 poentoj, la parolan parton. Pro praktikaj kialoj maksimume 24 kandidatoj povos ekzameniĝi. Pro tio, anticipa sinanonco estas konsilinda. Anoncu vin, prefere antaŭ la 15-a de junio 2008, ĉe la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK), s-ro Reza Torabi (torabireza@gmail.com; Apt. 1, No: 65, Kh: Arian Mahmudi, Kh: Dabestan, Seyyed Khandan, IR-1631675613 Tehran, Irano), kaj samtempe pagu la speciale favoran ekzamenkotizon (40% de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato) al UEA-konto ilek-a. Kaze de neprezentiĝo aŭ nesukceso en la gramatika testo, oni rericevos 50% de la pagita kotizo. Se la maksimuma nombro de ekzamenotoj ne jam estos atingita, eblos sin anonci surloke ĉe la ILEI-budo en dimanĉo. Tiam la ekzamenkotizo estos 60% de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato. Oni aparte atentigas UEA-delegitojn pri la rekomendo de la Estraro de UEA, ke la delegitoj "atingu almenaŭ la nivelon de la meza ekzameno". Simile, laŭ la regularo pri la nova ILEI/UEA-ekzameno pri instrukapablo, "kandidatoj devas posedi Esperanton minimume ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA". Detalajn informojn pri la ekzamenoj, inkluzive de specimenaj testoj, oni trovas en la *Gvidilo al Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* (2-a eld., elĉerpita). Bazaj informoj pri la ekzamenoj kaj specimenaj testoj troviĝas ankaŭ ĉe http://www.edukado.net/ekzilei.jsp.

Lingvoekzercado kun edukado.net. Post la granda sukceso atingita dum la pasintjaraj UK-oj, edukado.net denove gvidos paroligajn kursojn por la partoprenantoj de la UK. La du paralelaj kursoj – kiuj okazos dufoje tage dum kvar tagoj el la UK-semajno, do entute ok fojojn – estas celataj por komencantoj kaj meznivelaj parolantoj de la internacia lingvo. La programojn gvidos la konataj Esperanto-pedagogoj s-ino Katalin Kováts kaj s-ro Sylvain Lelarge.

Cseh-kurso kaj Cseh-seminario: "Zamenhof kreis la lingvon kaj Cseh la metodon por instrui ĝin", oni kutime diras en Esperantio. Jen, do, ŝanco konatiĝi kun la fama metodo iniciatita de Andreo Cseh kaj uzita de elstaraj instruistoj de nia E-historio kiel Henrik Seppik, Julio Baghy, Sigismundo Pragano, Lidja Zamenhof ktp. La kurso estas destinita al komencantoj kaj la seminario al instruistoj, kiuj deziras lerni la metodon aŭ akiri ateston pri ĝi. La seminarianoj devas havi la libron *Baza Cseh-Kurso* (aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA) kaj ankaŭ observi la kurson. La kurson gvidos

Ed Borsboom kaj la seminarion Atilio Orellana Rojas. La partopreno en ambaŭ aranĝoj estas aparte pagenda. La kotizo por la kurso kaj la seminario estas EUR 50,00 por enloĝantoj en landoj de A-kategorio, por B-landanoj EUR 38,00. La kotizo por la seminario inkluzivas la observadon de la kurso. Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la organizantoj: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; ❑ iei001@tiscali.nl.

Kiu kongresas kiam kaj kie?

39-a Internacia Infana Kongreseto (IIK), 19-26 julio 2008, en Oostvoorne, 40 km okcidente de Roterdamo. Ni invitas infanojn kaj junulojn kun bona rego de Esperanto al neforgesebla semajno. La 39-a IIK okazos en la komforta kaj hejmeca junulargastejo Samuel Naardenhuis (la tuta domo estos rezervita por IIK!) apud lagoj, strando kaj bunta naturo. Tuttaga ekskurso iros al la kelkfoje internacie premiita amuziĝparko Efteling. Por ĉiu grupo de ses infanoj ĉeestos unu plenkreskulo. Pliaj informoj kaj aliĝilo troveblas en la retpaĝo de IIK: ⊕http://bertosch.free.fr/iik2008 aŭ ĉe la IIK-administranto: Bert Schumann, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francio; ❑bert.schumann@free.fr.

41-a ILEI-Konferenco okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2008 en Portonovo, Benino. Temo de la konferenco: "ILEI-konferenco en Afriko – Kial?" La konferencejo kaj tranoktejo estos en Songai-Centro. Estas planata bunta programo kun i.a. inaŭguro, komitatkunsidoj, estrarkunsidoj, ekzamenoj de ILEI/UEA, artaj aranĝoj, bankedo kaj diversaj ekskursoj. Pliaj kaj detalaj informoj ĉe la retejo ⊕http://www.ilei.info/novaĵoj/portonovo.php. Informoj pri la konferenco haveblas en la hejmpaĝo de ILEI, ⊕http://www.ilei.info, kaj ĉe ILEI-estrarano pri konferencoj Aida Čižikaitė, Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio; ❑aidute@mail.lt.

63-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). La IJK okazos en Szombathely, Hungario, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2008. Aliĝoj kaj informoj ĉe TEJO/IJK, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 10 436 1044, 🖷+31 10 436 1751; ❑oficejo@tejo.org. Vizitu ankaŭ la TTT-ejon: ⊕http://esperanto.net/ijk2008.

Ĝeneralaj informoj

Disdonado de propagandiloj kaj informiloj. Universala Kongreso estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri iu nova iniciato, pri specialaj agadoj de via faka asocio, por reklami novan eldonaĵon aŭ revuon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, por anonci iun renkontiĝon, kursaron,

varon. La plej efika maniero estas enmeti la informilon en dokumentujon kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo estas aparte pagenda (275 eŭroj), kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA por disdonado. Neniu dokumento rajtas esti distribuata en la kongresejo sen permeso de la Estraro.

Salonmendoj kaj standoj (budoj). Ĉiuj fakaj asocioj konataj al UEA ricevis mendilon por havi salonon por sia kunveno dum la UK, se ili tion bezonas. Salonmendoj devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31-a de marto de la kongresa jaro. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocioj. Se via asocio ankoraŭ ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso. Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj kiuj volas aparte efike informi kongresanojn, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon dum la kongreso (380 eŭroj). Tiujn budojn oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

Kongresa Libroservo. Universala Kongreso estas okazo ankaŭ por aktualigi vian bibliotekon, aĉetante en la plej riĉa E-vendejo de la jaro: la Kongresa Libroservo. Multaj novaj libroj, interalie el la kongreslando mem, estos unuafoje lanĉitaj en la Kongresa Libroservo, en kiu plurajn titolojn eblos aĉeti ankaŭ kun speciala rabato. La Kongresa Libroservo havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Se vi aŭ via asocio volas vendigi viajn eldonaĵojn, necesas ke vi ofertu ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la kongreso.

Pagmanieroj. Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun kiu estas por vi la plej oportuna kaj plej malkara. Tamen bv. noti ke la plej sekura kaj rapida vojo estas poŝta aŭ banka monĝiro. Se vi mendas proksime al la limdatoj, bv. ankaŭ noti ke pagoj al poŝtaj kontoj ekster Nederlando (Germanio, Svedio k.s.) povas foje daŭri eĉ unu monaton. Nepre konsideru malfermon de konstanta konto ĉe UEA, ĉar tio havas plurajn avantaĝojn. Bonvolu ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn mendilojn al la sama instanco. Kotizojn kaj donacojn al la bonfaraj kasoj oni prefere pagu al la landa peranto (vidu la liston de la oficialaj perantoj sur la interna dorskovrilo).

Pagojn por loĝigo, ekskursoj, bankedo kaj flugbileto faru rekte al Universala Kongreso de Esperanto en unu el la jenaj manieroj:

– poŝta ĝirkonto: nederlanda konto 62 73 37 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdam. IBAN-numero: NL48PSTB0000627337, SWIFT (BIC)-kodo: PSTBNL21.

– banko: per banka ĝiro al konto 42.69.01.444 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto ĉe ABN-AmRo Bank, Rotterdam. IBAN-numero: NL86ABNA0426901444. SWIFT (BIC)-kodo: ABNANL2A.

– UEA-konto: personoj kun sufiĉa bonhavo ĉe UEA povas sendi mendilojn kaj peti debeton al sia persona konto.
– monbiletoj: oni povas sendi monbiletojn (en eŭroj aŭ valuto ŝanĝebla al eŭroj) al la konstanta adreso, prefere en registrita koverto.
– al la poŝtokonto en la nomo de Universala Esperanto-Asocio en Belgio: 000-1631831-97 / Germanio: Köln 3182.91.509 BLZ 370 100 50 / Svedio: 74374-0 / Svislando: Bulle 12-2310-0.

Se vi pagos per banka ĉeko, sendu ĝin al la konstanta adreso (vd. p. 36). La ĉeko estu en eŭroj. Pagante per banka ĝiro aŭ ĉeko de ekster Nederlando, nepre aldonu 20 eŭrojn por la bankkostoj. Prefere ne sendu ĉekojn kiuj ne estas titolitaj al unu el la bankoj en Nederlando. Kostoj por ili povas esti tre altaj. Ne forgesu ĉiam klare indiki la celon de via pago.

Kreditkartoj. Eblas pagi ankaŭ per kreditkartoj Visa, Eurocard, Mastercard kaj American Express, indikante la numeron de la karto, la daton ĝis kiam ĝi validas, kaj la 3-kontrolciferojn malantaŭ la kartoj (CVC-numero). En tiu kazo la pagata sumo tamen devas esti plialtigita per 5% pro administraj kostoj, tiel ke por grandaj sumoj estas konsilinde uzi alian pagmanieron.

Asekuro. La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron. Necesas do, ke ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga asekuro ekz. kontraŭ akcidento kaj malsano dum la kongreso. La kongreso ne repagas mendojn (ekz. por loĝado, ekskursoj, bankedo), se la malmendo venas post la difinita limdato. Ĉar temas pri relative grandaj monsumoj, estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno. Pri tio konsultu vian kutiman asekuriston.

Donacoj. La kongreso bonvenigas donacojn por la ĉi-subaj celoj:
– Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon en la Internacia Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Fondaĵo Canuto: helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Triamonda Kaso: helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.
– Blindula Kaso: helpas al blindaj kongresanoj.
– Volontula Fondaĵo: subtenas volontulan servon ĉe la Centra Oficejo.
– Ĝenerala Kaso: por la ĝenerala subteno al la organizado de la UK.
Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

Kontaktinformoj

Centra Oficejo de UEA, Kongresa Administracio: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 (0)10 436 1044, 🖷+31 (0)10 436 1751; 🖳kongresoj@co.uea.org. *N.B.* Pri ĉiuj aferoj bv. korespondi nur kun la CO kaj neniam skribi al LKK. LKK-anoj ne povas trakti individuajn petojn kaj leterojn kaj ne respondos ilin.

La flugkompanioj de Star Alliance estas kontentaj esti via oficiala flugkompania reto por la 93-a Universala Kongreso de Esperanto.

Voku al iu ajn el niaj membro-kompanioj kaj simple citu la eventan kodon **LH07S08** por ricevi detalojn kaj kondiĉojn pri la tarifoj de *Star Alliance™ Convention Plus* kaj la partoprenantaj flugkompanioj.

Kiam vi mendas vian flugon, bv. prezenti la kongresan konfirmilon kaj certiĝu ke la eventa kodo **LH07S08** estas indikita sur via flugbileto.

Partoprenantaj flugkompanioj: Air Canada, Asiana Airlines, Lufthansa, Singapore Airlines, TAP Portugal, Swiss International Air Lines, Austrian Airlines, LOT Polish Airlines, Scandinavian Airlines, United, Spanair.

Por informoj pri niaj membro-kompanioj kaj aliaj produktoj, vizitu nian TTT-ejon ĉe: www.staralliance.com.

STAR ALLIANCE™
Kiel la Mondo konektiĝas.

AIR CANADA
AIR CHINA
AIR NEW ZEALAND
ANA
ASIANA AIRLINES
Austrian
bmi
LOT POLISH AIRLINES
Lufthansa
SAS Scandinavian Airlines
SHANGHAI AIRLINES
SINGAPORE AIRLINES
SOUTH AFRICAN AIRWAYS
Spanair
swiss
TAP PORTUGAL
THAI
UNITED
US AIRWAYS